

Planedoj Zamenhof kaj Esperanto

Claude Gacond, 167-a radioprelego, 1966.12.21 & 1966.12.24

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En la kristnaska periodo oni emas rakonti pri paŝtistoj, kiuj aŭdis ĉielajn voĉojn kaj pri legendaj reĝoj, kiuj rigardis al stela lumo.

A.- Oni imagas plej diversajn fabelojn por plaĉi al la infana kredemo kaj al sia propra fantazio.

Cl.- Ni hodiaŭ ankaŭ rakontu pri steloj, miksante iom da vero kun ankaŭ iom da fantazio, por ke vi havu vian fabelon.

A.- La revuo *Homo kaj Kosmo* prezentas en sia lasta numero fotografajon de ĉielregiono, en kiu troviĝis la 22-an de februaro 1966 eta planedo nomata Zamenhof.

Cl.- Ĉu vi sciis, ke en nia ĉielo orbitas ĉirkaŭ nia suno planedo, kiu personigas la Majstron?

A.- Sur preskaŭ identa orbito rapidas eta planedo, kiu ricevis la nomon de nia lingvo.

Cl.- Do kiam vi rigardas al la ĉielo, per verŝajne bonaj okulvitroj, vi riskas vidi Zamenhofon, kiu, laŭ la kalkuloj, rondiras ĉirkaŭ la Suno dum 5 jaroj kaj 217 tagoj.

A.- Aŭdante tiujn ciferojn ni ekkomprenas la paciencon de Zamenhof. Se oni kalkulas la aĝon de lia lingvo laŭ lia kalendaro, laŭ kalendaro en kiu jaro daŭras 2040 tagojn, tiam oni rimarkas, ke esperanto, kiun ni kredis baldaŭ okdekjara, estas apenaŭ dekkvarjara!

Cl.- La rapido de Zamenhof kaj de Esperanto laŭ la astronomiaj kalkuloj iomete diversas. Tio kaŭzas, ke ili alproksimiĝas unu al la alia post ĉiuj 186 jaroj. La lastan fojon tio okazis ĉirkaŭ la jaro 1840.

A.- Do antaŭ la tera naskiĝo de Zamenhof?

Cl.- Jes, dek ses jarojn antaŭ lia alveno sur la planedo Tero. Eble okazis al li, same kiel al la Eta Princo renkontita de Saint-Exupéry. Sed anstataŭ alteriĝi en la dezerta Saharo, li falis en la eŭropan babelejon.

A.- Kiel la Eta Princo li ne povis akcepti la teran realecon. Li miris pri la strangeco de tiuj homoj, kiuj malgraŭ la kapablo paroli kaj aŭdi restas inter si surdaj.

Cl.- Kaj ĉar li estis renkontinta antaŭ dek ses teraj jaroj aŭ antaŭ tri zamenhofaj jaroj la facilan kaj belsonan lingvon parolata sur la planedo Esperanto, tiam li ne povis rezisti diskonigi tiun ĉielan idiomon.

A.- Nun li verŝajne atendas la novan rendevuon kun la planedo Esperanto. Laŭ la kalkuloj de nia samideano profesoro Väisälä tiu renkonto okazos en la tera jaro 2016, do ekzakte post 50 jaroj. Estos baldaŭ la momento komenci organizi universalan kongreson por la esperantistaj astronautoj. Kvindek jaroj por tia aranĝo estas rapide for. Do ekal!

Cl.- Sed vi eble deziras kelkajn informojn pri tiuj du planedoj, kaj pri tiu profesoro Väisälä.

A.- Vi scias, ke ĉirkaŭ la Suno ne nur rondiras grandaj planedoj kiel Merkuro, Venuso, Tero, Marso, Jupitero, Saturno, Urano, Neptuno kaj Plutono.

Cl.- Ekzistas krom tiuj 9 planedoj centmiloj da aliaj planedetoj. Ili ĝenerale orbitas inter Marso kaj Jupitero. Laŭ la kalkuloj de la astronomoj, pro ilia tro granda nombro okazas multaj karamboj.

Planedoj Zamenhof kaj Esperanto

Claude Gacond, 167-a radioprelego, 1966.12.21 & 1966.12.24

A.- Ho, ne tro timu tamen por Zamenhof kaj Esperanto. Unu planeteto karambolas kun alia planeteto probable po unufoje en miliono da jaroj.

Cl.- Tiu tempo estas longa laŭ homa mezuro, sed la planetetoj ekzistas ekde pli longe ol cent milionoj da jaroj, do ĉiu planeteto dum la tempo de sia ekzisto travivis jam minimume cent koliziojn kun aliaj planetetoj.

A.- Estas pli agrable vivi sur la planedo Tero.

Cl.- Jes ja, pro tio la homoj provas forveturi sur aliajn planedojn !

A.- Sed kiamaniere tiu profesoro malkovris Zamenhofon kaj Esperanton ? Ĉu li estas astrologo ?

Cl.- Ne, tute ne, li estas serioza astronomo tre fama en Finnlando, kaj krome li estas esperantisto, do oni povas fidi liajn dirojn. La 18-an de marto de la tera jaro 1936 observante la ĉielon li rimarkis la ekziston de nova planedo. Tiu astro ricevis tuj numeron. La numeron 1421. Ĝi estis regule observata ĝis kiam ĝia orbito ĉirkaŭ la Suno estis determinita. Kaj laŭ la propono de nia astronomo-samideano tiu planedo ricevis en 1956, do antaŭ dek jaroj, la nomon Esperanto. Dum ĝia plej granda alproksimiĝo al la Tero tiu planedo estas rimarkebla kiel tre malforta steleto. Ĝi pro tio estas videbla nur per la plej grandaj teleskopoj. Ĝiaj dimensioj ne estas pli grandaj ol kelkdek kilometroj en la diametro.

A.- Kaj Zamenhof ?

Cl.- Ĝi estis malkovrita du jarojn poste, do en 1938, la 6-an de februaro, ankaŭ de profesoro Väisälä en Turku. Ĝi ricevis la numeron 1462 kaj ankaŭ en 1956 la nomon Zamenhof. Ĝi estas pli malgranda ol Esperanto.

A.- Ĉu la astronomoj facile revidas tiujn planedojn ?

Cl.- Ne tre. La revuo *Homo kaj Kosmo* rakontas, ke tiun ĉi jaron krakovaj geastronomoj, ankaŭ samtempe geesperantistoj, nome gesinjoroj Kazimierz Kordylewski, ekinteresiĝis speciale pri la planedo Zamenhof. Ili jam estis povintaj foti Zamenhofon en 1964, sed pro nebula vetero tiu dokumento estis fuŝa. La 2-an de februaro de tiu ĉi jaro Zamenhof denove estis plej proksima al la Tero. Kaj ankaŭ ĉifoje la pola ĉielo nebulis. Niaj gesamideanoj do sin turnis al la Observatorio en Jena, kie la ĉielo estis pli afabla por Zamenhof. Kaj per teleskopo kun spegulo 90-centimetra diametre la astronomo W. Pfau fine povis foti Zamenhofon. Evidentiĝis, ke la planedo ne estis precize en la loko antaŭvidita laŭ la ĝisnuna orbito kalkulita sur la bazo de dekseksjaraj diverslandaj observoj.

A.- Do estas risko, ke Zamenhof kaj Esperanto perdiĝos.

Cl.- Jes, iliaj orbitoj ŝanĝiĝis pro la altira forto de la grandaj planedoj. Pro tiuj eblaj ŝanĝiĝoj gesinjoroj Kordylewski ne povis riski atendi la sekvontan alproksimiĝon al la Tero, la planedo estus povinta intertempe perdiĝi je niaj okuloj pro manko de observoj.

A.- Verŝajne estonte la esperantistoj tre atente observos la veturojn de Zamenhof kaj Esperanto.

Cl.- Jes, kaj eble UEA fondos sekcion kun jarkotizoj por subteni tiun observadon.

A.- Kaj uzante la kalkulitajn ĉiferojn la astrologoj kaj sudamerikaj spiritistoj eble povos kalkuli ankoraŭ kiom da jaroj estos necesaj, ĝis kiam la portreto de Zamenhof estos en la histori-libroj de niaj infanoj kaj esperanto unu el iliaj lernfakoj.

Cl.- Vi aŭdis radio-elsendon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !